# KODEJO

Kompleta Demandaro por Esperantaj Junularaj Organizoj



# 2020

## RAPORTO PRI LA JUNULARA MOVADO

tejo

tejo

Tutmonda Esperantista Junulara Organizo

# Raporto pri la Kompleta Demandaro por Esperantaj Junularaj Organizoj (KODEJO) 2020

*Raporto pri junularaj esperantistaj movadoj en januaro-decembro 2020*

**Komisiono pri Landa kaj Faka Agado (LFA)**
2021-2022

**Pretigis kaj redaktis**
Albert Stalin Garrido

**Reviziis**
Arya Bhaskara Ferduzi
Patrício Agustin Iglesias
Tyron Surmon
Lenka Doškářová

**Kovrilpaĝon kaj paĝokapon desegnis**
Ariel Palmer

## Enhavtabelo

**Enkonduko** 4
- Ĝenerala Enkonduko 4
- Aktuale: Raporto pri KODEJO 2020 4
- Partoprenintoj 5
  - Landaj organizoj 6
  - Fakaj organizoj 7

**KODEJO 1: Ĝenerala Demandaro** 8
- Ĝeneralaj Informoj 8
  - Membreco en TEJO 8
  - Agadplano 8
  - Membraro 9
  - Aktivularo 10
  - Estraro 11
  - Eventoj kaj Iniciatoj 12
  - Movada Konsisto, Strukturo, kaj Jura Personeco 14
- Rilatoj kun TEJO kaj aliaj organizoj 15
- Junularaj organizoj dum la Pandemio 18
- KODEJO 1: Konklude 24

**KODEJO 2: Demandaro pri Informado kaj Varbado** 25
- Informado 25
  - Interna Komunikado 26
- Ĝeneralaj kaj specifaj bezonoj pri Informado 29
- Informado kaj Varbado dum la Pandemio 29
- KODEJO 2: Resume kaj Konklude 32

**KODEJO 3. Demandaro pri Financoj** 33
- Bazaj Informoj 33
  - Membrokotizoj 33
  - Monfontoj 34
  - Subvencipetado 35
- Ĝeneralaj kaj specifaj bezonoj pri Financoj 38
- Financoj dum la Pandemio 38
- KODEJO 3: Konkludoj 40

**Rekomendoj** 41
- Ĝeneralaj Rekomendoj pri Funkciado 41
- Ĝeneralaj Rekomendoj pri Informado kaj Varbado 41
- Ĝeneralaj Rekomendoj pri Financoj 41

# 1. Enkonduko

## 1.1. Ĝenerala Enkonduko

La Kompleta Demandaro por Esperantaj Junularaj Organizoj, plej bone konata per la mallongigo **KODEJO**, estas ĉiujara enketo organizita de TEJO pri la ĝenerala stato de ĝiaj landaj kaj fakaj sekcioj, nealiĝintaj junularaj organizoj, kaj landaj referencpunktoj tra la mondo, kaj la evoluoj kiuj okazis ĉe ili. Per KODEJO, organizoj kaj referencpunktoj pri lando aŭ fako raportas pri siaj funkciado kaj progreso en la pasinta jaro. Tiel, KODEJO funkcias kvazaŭ centra kompilaĵo de jaraj raportoj de junularaj movadoj tutmonde.

La ĉefa produkto de KODEJO estas ĉi tiu ampleksa raporto, kiu detaligas kaj komparas per statistikoj kaj ilustraĵoj la ĝeneralajn kaj specifajn elementojn kaj tendencojn de la funkciado kaj progresado de junularaj esperantistaj organizoj tra la mondo.

La specifaj celoj de KODEJO estas la jenaj:

- vidi kaj analizi la esencajn indikilojn de kresko kaj aktiveco de junularaj organizoj kaj neorganizitaj movadoj, ekzemple en siaj membronombro, financa stato, aktiveco en la organizado de fizikaj kaj retaj aranĝoj, kunlaboro kun aliaj organizoj, interalie;
- konstati kaj kompari malsamajn praktikojn pri funkciado kaj agado inter organizoj kaj eltiri kaj elstarigi el tiuj praktikoj eventualajn bonajn praktikojn kiujn eblas apliki ĉe diversaj skaloj kaj rekomendi al aliaj organizoj; kaj
- informi la diversajn organojn de TEJO pri la bezonoj de organizoj kaj referencpunktoj kaj influi en la pozitivan direkton la estontan planadon de tiuj organoj de TEJO.

## 1.2. Aktuale: Raporto pri KODEJO 2020

KODEJO 2020, kies ĉefa celo estis enketi pri la stato de organizoj en 2020, estis lanĉita kaj fermita en julio 2021. KODEJO 2020 konsistis el la jenaj tri demandaroj:

- **KODEJO 1 (Ĝenerala Demandaro)**
- **KODEJO 2 (Demandaro pri Informado kaj Varbado)**
- **KODEJO 3 (Demandaro pri Financoj)**

Al KODEJO 2020 venis multaj ŝanĝoj kiuj rezultis el pluraj monatoj de kunlaborado kaj reviziado. Inter tiuj ŝanĝoj estis lingvaj korektoj, enhavaj revortumoj kaj simpligoj. Plej grave, tamen, estis la aldono de demandoj, kiuj specife celis prilumi la efikojn de la pandemio (KOVIM-19) sur junularajn organizojn en 2020 kaj kiel organizoj agadis malgraŭ ties limigoj. Per tiuj demandoj, TEJO povus ekscii, kiel ĝi povus plibonigi sian agadon por helpi landajn kaj fakajn komunumojn por iel regajni sian aktivecon.


## 1.3. Partoprenintoj

Respondis la demandaron entute 17 landaj organizoj kaj 2 fakaj organizoj. Estas grave klarigi, ke ne ĉiuj organizoj kiuj partoprenis plenigis ĉiujn formularojn. La ĉi-suba tabelo montras, kiel ĉiu respondinta organizo partoprenis la enketadon:

Tabelo 1. Junularaj organizoj kaj ilia partopreno en la demandaroj de KODEJO
*(J: Respondis la demandaron; N: Ne respondis)*

| Organizo | KODEJO 1 | KODEJO 2 | KODEJO 3 |
|---|---|---|---|
| **BEJO (Brazilo)** | J | J | J |
| **JEB (Britio)** | J | J | J |
| **ĈEJ (Ĉeĥio)** | J | J | J |
| **DEJO (Danio)** | J | J | J |
| **FEJ (Filipinoj)** | J | J | J |
| **JEFO (Francio)** | J | N | N |
| **GEJ (Germanio)** | J | J | J |
| **HEJ (Hungario)** | J | J | J |
| **IREJO (Irano)** | J | J | J |
| **IEJ (Italio)** | J | J | J |
| **KEJ (Katalunio)** | J | J | J |
| **KEJO (Kubo)** | J | J | J |
| **MEJ (Meksiko)** | J | N | N |
| **NEJ (Nederlando)** | J | J | J |
| **MJS (Skotlando)** | J | J | J |
| **SKEJ (Slovakio)** | J | J | J |
| **KEJ (Sud-Koreio)** | J | J | J |
| **BEMI** | J | J | J |
| **ELiSo** | J | J | J |

### 1.3.1. Landaj organizoj




*Grafiko 1. Monda mapo kun la landaj sekcioj de TEJO (tiuj markitaj en malhela blua respondis KODEJOn 2020; la ceteraj en hela blua ne respondis KODEJOn 2020)*

Entute 17 landaj junularaj organizoj partoprenis kaj plenigis la demandarojn:

1. **Brazilo** | Brazila Esperantista Junulara Organizo (BEJO)
2. **Britio** | Junularo Esperantista Brita (JEB)
3. **Ĉeĥio** | Ĉeĥa Esperanto-Junularo (ĈEJ)
4. **Danio** | Dana Esperantista Junulara Organizo (DEJO)
5. **Filipinoj** | Filipina Esperanto-Junularo (FEJ)
6. **Francio** | Junulara Esperantista Franca Organizo (JEFO)
7. **Germanio** | Germana Esperanto-Junularo (GEJ)
8. **Hungario** | Hungara Esperanto-Junularo (HEJ)
9. **Irano** | Irana Esperantista Junulara Organizo (IREJO)
10. **Italio** | Itala Esperantista Junularo (IEJ)
11. **Katalunio** | Kataluna Esperanto-Junularo (KEJ)
12. **Kubo** | Kuba Esperantista Junulara Organizo (KEJO)
13. **Meksiko** | Meksika Esperanto-Junularo (MEJ)
14. **Nederlando** | Nederlanda Esperanto-Junularo (NEJ)
15. **Skotlando** | Movado Junulara Skota (MJS)
16. **Slovakio** | Slovakia Esperanta Junularo (SKEJ)
17. **Sud-Koreio** | Korea Esperanto-Junularo (KEJ)

Partopreno laŭ kontinento estas: Eŭropo (11), Ameriko (3), kaj Azio-Oceanio (3). Partoprenis neniu landa organizo el Afriko.

### 1.3.2. Fakaj organizoj

Krom la landaj organizoj partoprenis ankaŭ du (2) fakaj organizoj:

- Biciklista Esperantista Movado Internacia (BEMI)
- Esperanto kaj Libera Scio (ELiSo)

# 2. KODEJO 1: Ĝenerala Demandaro

KODEJO 1 aŭ la Ĝenerala Demandaro estas la unua el tri demandaroj kiuj konsistigas la Kompletan Demandaron por Esperantaj Junularaj Organizoj (KODEJO). Ĝi celis eltiri la plej bazajn kaj esencajn informojn pri la funkciado kaj evoluo de organizoj kaj inkluzivis demandojn koncernajn al: membraro, aktivularo, jura personeco kaj strukturo, eventoj, ĝenerala evoluo, ktp. Por vidi la kompletan Ĝeneralan Demandaron alklaku ĉi tie.

## 2.1. Ĝeneralaj Informoj


### 2.1.1. Membreco en TEJO

Inter la 19 partoprenintaj organizoj, 17 estas sekcioj de TEJO kaj 2 ne estas. La landaj kaj fakaj sekcioj de TEJO estas la jenaj: BEJO, JEB, ĈEJ, DEJO, FEJ, JEFO, GEJ, HEJ, IREJO, IEJ, KEJ (Katalunio), KEJO, MEJ, NEJ, SKEJ, KEJ (Sud-Koreio), BEMI.

Esperanto kaj Libera Scio (ELiSo) respondis, ke ĝi estas meze de la procedo iĝi faka sekcio, dum Movado Junulara Skota (MJS), notinde fondita nur en 2020, ankoraŭ nek estas sekcio, nek estas submetinta ian kandidatiĝon por iĝi sekcio.

### 2.1.2. Agadplano

Agadplano ĉi-kuntekste specife signifas "ajnan dokumenton, per kiu koncerna organizo difinas sian agadon en iu difinita periodo." La plejmulto (12) el la organizoj deklaris, ke ĝi ne aprobis iun agadplanon en 2020, dum nur ses (6) deklaris esti havinta agadplanon. Unu cetera konstatis, ke la demando ne estis aplikebla al ili.




*Grafiko 2. Organizoj laŭ (ne)havebleco de agadplanoj en 2020*

### 2.1.3. Membraro

Plejmulto (16) el la partoprenintaj organizoj donis precizajn aŭ proksimumajn ciferojn de siaj membrokvantoj. Inter tiuj, kiuj deklaris kvantojn, plejmulto (12) informis ke ili ne havis pli ol 50 membrojn. Du organizoj deklaris esti havintaj inter 50 kaj 100 membrojn kaj du pliaj havis pli ol 100. Aliflanke, BEMI klarigis ke ne eblis al ili kalkulado de la kvanto da membroj pro manko de formala membraro, dum MEJ kaj IREJO ne donis iun ciferon.

Tabelo 2. Landaj organizoj kategoriigitaj kaj ordigitaj laŭ siaj deklaritaj membronombroj.

| Membrokvanto | Laŭkategoria ordo de organizoj | | | |
|---|---|---|---|---|
| 121-160 | HEJ (136) | | | |
| 81-120 | GEJ (102) | SKEJ (98) | BEJO (93) | |
| 41-80 | FEJ (43) | JEFO (41) | | |
| 1-40 | IEJ (39) | JEB (31) | NEJ (35) | KEJO (30) |
| | MJS (ĉ. 27) | KEJ, Sud-Koreio (23) | KEJ, Katalunio (21) ELiSo (21) | ĈEJ (11) |
| | DEJO (10) | | | |


Suplemente al la ĉi-supra informo, KODEJO ankaŭ petis al la partoprenintoj pritakson pri tio, kiel evoluis iliaj membrokvantoj je la fino 2020 el tiu je la fino de 2019. Aperas, ke inter 15, kiuj donis difinitan respondon, ne estis plimulta respondo: nur 5 opiniis, ke ilia membraro pozitive kreskis de 2019 al 2020, 6 observis neŭtralan evoluon (t.e., ke ne estis notinda evoluo al sia membrokvanto), dum 4 aliaj notis, ke iliaj membraroj malkreskis de 2019 al 2020. Cetere, ELiSo, MJS, KEJ (Sud-Koreio), kaj BEMI donis neniun takson aŭ ne sciis, ĉu entute estis evoluo.

Tabelo 3. La organizoj kaj iliaj pritaksoj de la evoluo de siaj membraroj.

| Evoluo de Membraro (2020 kontraŭ 2019) | Organizoj |
|---|---|
| **Pozitiva (+) Kresko** | BEJO, FEJ, KEJ (Katalunio), MEJ, NEJ |
| **Neŭtrala (0) Kresko** | JEB, ĈEJ, DEJO, IREJO, IEJ, SKEJ |
| **Negativa (-) Kresko** | JEFO, GEJ, HEJ, KEJO |
| **Ne aplikeblas/Ne scias** | ELiSo, MJS, KEJ (Sud-Koreio), BEMI |

Estis entute pozitiva afero, ke kelkaj organizoj notis ian kreskon en sia membraro en 2020, konsiderante ke la pandemio KOVIM-19 kaŭzis, ke multaj organizoj stagnis sur multaj agadkampoj, specife sur membrovarbado.

Aldone, la Komisiono ankaŭ demandis al ĉiu organizo pri tio, kiom ofte ĝi kunvenas pere de membrokunvenoj (kaj simile). Preskaŭ duono (8) respondis, ke ilia membraro kunvenas neregule, dum preskaŭ triono (6) ĉiun jaron, 2 ĉiun monaton, dum 1 organizo kunvenas ĉiun duonjaron kaj 1 plia ĉiun trian monaton. Cetere, DEJO deklaris, ke al ili ne aplikeblis la demando.




*Grafiko 3. Organizoj laŭ ofteco de membrokunvenoj*

### 2.1.4. Aktivularo

Krom la kvanton da membroj, respondintaj organizoj ankaŭ kalkulis la kvanton de siaj aktivuloj (kiu signifas en tiu ĉi kunteksto "membrojn, kiuj donis rimarkindan aŭ konsiderindan aktivadon plenumante siajn rolojn en la organizo"). Ĉiuj krom IREJO donis precizajn aŭ proksimumajn ciferojn, kiuj estas ĉi-sube entabeligitaj:

Tabelo 4. Organizoj kaj la taksitaj kvantoj da aktivuloj en 2020


| Organizo | Nombro de aktivuloj (takso) |
|---|---|
| BEJO | 20 |
| JEB | 3 |
| ĈEJ | 11 |
| DEJO | 4 |
| FEJ | 19 |
| JEFO | 5 |
| GEJ | 20 |
| HEJ | 7 |
| IREJO | - |
| IEJ | 10 |
| KEJ (Katalunio) | 4-6 |
| KEJO | 15 |

| | |
|---|---|
| MEJ | 5 |
| NEJ | 11 |
| SKEJ | 10 |
| MJS | 3 |
| KEJ (Sud-Koreio) | 10 |
| BEMI | 8 |
| ELiSo | 12 |
| Averaĝo | 9.944 ≈ 10 |
| Mediano | 10 |
| Sumo | ~177 |

Kalkulante la averaĝon de la ĉi-supraj ciferoj, oni povus supozi, ke estis averaĝe 10 aktivuloj en organizo, dum sume estis minimume 177 aktivuloj kiuj agadis ene de 19 organizoj en 2020. Inter la respondintoj, GEJ kaj BEJO havis la plej altan nombron da aktivuloj (po 20), dum JEB kaj MJS, ambaŭ en la sama regno, havis la plej malaltan (po 3). Oni devas noti, ke tiu ĉi taskado ne nepre spegulas la efektivan kvanton da aktivuloj en esperantistaj junularaj organizoj, ĉar personaj difinoj varias.

### 2.1.5. Estraro

Preskaŭ duono (9) el la respondintaj organizoj deklaris, ke ilia estraro renoviĝas ĉiun jaron, dum 6 aliaj ĉiun duan jaron kaj 1 plia ĉiun trian jaron. Du aliaj organizoj respondis ke la iliaj renoviĝas neregule. MJS, kiu estas nova organizo fondita en 2020, klarigis, ke ĝi ne formale nomas sian gvidantaron "estraro" kaj ankoraŭ neniam efektivigis tian renovigon.




*Grafiko 4. Organizoj laŭ ofteco de estrara renovigo (per balotado, nomumo, ktp.)*

Krome, la Komisiono ankaŭ enketis pri la ofteco de estraraj kunvenoj, al kio plimulto (11) respondis, ke iliaj estraroj kunvenas neregule, dum la ceteraj estas jene: tiuj de 4


organizoj kunvenas ĉiun monaton, 2 kunvenas du fojojn monate, 1 ĉiun duan monaton kaj 1 plia ĉiun trian monaton. Inter tiuj kunvenantaj neregule estas MJS, kiu deklaris, ke kvankam mankas al ĝi formala estraro, ĝi kunvenigas siajn gvidantojn laŭbezone.




*Grafiko 5. Organizoj laŭ ofteco de estraraj kunvenoj*

### 2.1.6. Eventoj kaj Iniciatoj

Estas vasta diverseco en la tipoj de eventoj kaj alispecaj iniciatoj, kiujn realigas junularaj organizoj, kiel ĉiam evidentiĝis en la antaŭaj KODEJO-j kaj same en ĉi tiu plej lasta. La plej popularaj estas regulaj, malgrandaj renkontiĝoj aŭ grandaj, pli formalaj kongresoj.




*Grafiko 6. Tipoj de eventoj organizataj de junularaj organizoj*


La ĉi-suba tabelo prezentas la plej gravajn iniciatojn, kiujn ĉiu organizo nomis:

Tabelo 5. Junularaj organizoj kaj iliaj ĉefaj iniciatoj (historie kaj nuntempe)

| Organizo | Ĉefaj iniciatoj |
|---|---|
| **BEJO** | Brazila Esperantista Junulara Kongreso (BEJK); BEJO-Konferencoj; BEJO-Ataŝeo "Lucas Barbosa"; Literatura Konkurso "Paulo Silas"; Subvencio "Studu en Poznano" (i.a.) |
| **BEMI** | BEMI-Karavanoj; BEMI-Semajno; Retaj BEMI-Tagoj |
| **ĈEJ** | Centrejo; Renkontiĝoj en Prago |
| **DEJO** | Roskilde-Festivalo; Klaĉkunveno Postsomera (KKPS) |
| **ELiSo** | VikiPrintempo COE; Azia Monato; Afrika Monato |
| **FEJ** | Filipinaj Esperanto-Renkontiĝoj (FER); Publikaj Enkondukaj Kursoj; Datrevena Tago (19/09);; Esperanto-Tago; Zamenhof-Tago |
| **GEJ** | Junulara E-Festivalo (JES); Kreema Esperanto-Kurso (KEKSO); Projektoj sub Erasmus+, ekz. "Florigu Egalecon inter Junuloj (FEJ)" |
| **HEJ** | Internacia Junulara Semajno (IJS) |
| **IREJO** | Irana Esperanto-Kongreso (IREK) |
| **IEJ** | Internacia Junulara Festivalo (IJF); Konversaciaj Rondoj de IEJ |
| **KEJ (Katalunio)** | Ĉiumonataj kunvenoj (retaj kaj fizikaj) |
| **KEJ (Sud-Koreio)** | Komuna Seminario (KS); Ĉiujara membrotrejnado |
| **KEJO** | Junulara Semajnfina Komuna Aranĝo (JuSKA); Paralela Universo; Ekstertera Kontakto; Junulara Programo en la Kongreso de Kuba E-Asocio |
| **MEJ** | Esperanto-kursoj (kunlabore kun Meksika Esperanto-Federacio) |
| **MJS** | Luda renkontiĝo pri Eŭrovido; Ludaj renkontiĝoj |
| **NEJ** | Klaĉkunveno Postsomera (KKPS); NEJ-Tagoj |
| **SKEJ** | Kunlaboro en Somera Esperanto-Studado (SES) kaj en Tutslovaka Esperantista Renkontiĝo |


### 2.1.7. Movada Konsisto, Strukturo, kaj Jura Personeco

Tiu ĉi sekcio enketas pri la ekzisto de nejunularaj esperantistaj asocioj en la landoj aŭ fakoj de la organizoj demanditaj kaj ankaŭ la stato de la kunlaboro kaj ligiteco inter la du movadoj. Unue, preskaŭ ĉiuj (17) krom du deklaris, ke en iliaj landoj aŭ fakoj ekzistas ankaŭ nejunularaj movadoj kaj ambaŭ flankoj, la junulara kaj la nejunulara, kunlaboras sur iu ajn nivelo. Aliflanke, HEJ deklaris, ke en ilia lando ekzistas nejunulara movado sed ili ne kunlaboras kun tiu, dum FEJ deklaris, ke tute ne ekzistas nejunulara movado sialande.





*Grafiko 7. Konsisto de la esperantista movado en la landoj de la respondintoj*

Inter tiuj, en kies landoj aŭ fakoj ekzistas nejunularaj esperantistaj organizoj, 8 diris, ke ili estis plene integritaj kaj agnoskitaj kiel junularaj sekcioj, dum 4 estis sendepende funkciantaj sed estis en oficiala kontrakto aŭ rilato kun la nejunularaj organizoj. Pliaj 4, aliflanke, deklaris ke ili estis plene sendependaj organizoj. La restantaj 3, FEJ kaj fakaj sekcioj ELiSo kaj BEMI respondis, ke la demando ne estis aplikebla al ili.




*Grafiko 8. Rilatoj kun samlandaj nejunularaj organizoj*

Trie, la organizoj priskribis siajn formalecon kaj strukturon, inkluzive de sia jura personeco. Pluraj (8) deklaris sin kiel jure registritajn sendependajn organizojn, dum pliaj 3 estas jure agnoskataj kiel sekciojn de la nejunularaj asocioj en siaj landoj. Aliflanke, 6 organizoj restas jure neregistritaj sed kun formala strukturo (estraroj, statutoj, ktp.) kaj 2, MJS kaj BEMI, nek estas jure registritaj nek havas formalan strukturon.




*Grafiko 9. Formaleco kaj strukturo de la organizoj*

## 2.2. Rilatoj kun TEJO kaj aliaj organizoj

### 2.2.1. Ĝeneralaj kaj specifaj bezonoj de organizoj ĉe TEJO

KODEJO sekve demandis organizojn, kiajn subtenojn ili ŝatus ricevi de TEJO aŭ kiel ili ŝatus kunlabori kun TEJO por plibonigi ilian ĝeneralan funkciadon kaj evoluon. Plej multaj organizoj (11) esprimis deziron, ke TEJO disponigu al ili varbajn kaj edukajn materialojn. Aliflanke, unu organizo asertis, ke ĝi bezonus nenian helpon de TEJO.

Organizoj taksis la jenajn tipojn de subteno aŭ kunlaboreblo kun TEJO gravaj (listo laŭ kvanto da organizoj, kiuj elektis ĉiun opcion):

1. **Disponigado de varbaj aŭ edukaj materialoj** (11)
2. **Kunorganizado de eventoj kaj transnaciaj projektoj** (10)
3. **Okazigado de trejnadoj kaj kapabligaj eventoj por membroj kaj aktivuloj** (10)
4. **Partoprenigo en internaciaj eventoj ekz. IJK, Retoso, ktp.** (10)
5. **Disponigado de retaj rimedoj ekz. Zoom-konto** (8)
6. **Informado pri loka agado en la kanaloj kaj materialoj de TEJO** (8)
7. **Senpaga membrigo en UEA/TEJO** (8)
8. **Mentorado kaj konsilado fare de spertaj aktivuloj de TEJO** (7)
9. **Monsubteno aŭ helpo pri subvencipetado** (6)
10. **Rilatigo kaj kunlaborigo kun aliaj landaj kaj fakaj sekcioj** (5)
11. **Partoprenigo de asociaj membroj en la komisionoj de TEJO** (4)


Krome, kelkaj organizoj ankaŭ esprimis deziron, ke TEJO ekfaru la jenajn specifajn iniciatojn, kiujn ĝi ankoraŭ ne estis faranta:

- "*TEJO devas okazigi pli da trejnado kiu celas specife junulojn en nia regiono.*"
- "*Plaĉus al ni kunsidoj inter sampostenaj estraranoj (t.e., kunsidoj por kasistoj, sekretarioj ktp.). La realigplano mencias tian iniciaton por ĝeneralaj sekretarioj, sed ĝi bedaŭrinde ne efektiviĝis.*"
- "*Pli granda disponigo de edukaj materialoj por memstudado*"
- "*TEJO havas amason de tre bonaj varbmaterialoj kaj flugfolioj ktp. Se TEJO povus ekzemple sendi pakaĵon de ili (kiam bezonata) al la landa sekcio, tio povus esti tre helpema.*"
- "*Ĉe ĉiuj ĉeestaj eventoj, [TEJO devas] aldoni informojn pri atingebloj per biciklo.*"

### 2.2.2. Rilatoj kun aliaj esperantistaj junularaj organizoj

La demandaro poste petis al organizoj, ke ili taksu kiel fortaj estis iliaj rilatoj kun aliaj esperantistaj junularaj organizoj. Tiucele ili disponis skalon: ekde 1 (ni tute ne rilatas kun aliaj organizoj), 2 (ni havas malfortajn rilatojn kun aliaj organizoj), 3 (ni havas rilatojn kun aliaj organizoj, nek tro fortajn nek tro malfortajn), 4 (ni havas sufiĉe fortajn rilatojn kun aliaj organizoj), ĝis 5 (ni havas fortajn kaj aktivajn rilatojn kun aliaj organizoj).

Ĝenerale ŝajnas, ke inter junularaj organizoj en la esperantista komunumo ekzistas nek tro fortaj, nek tro malfortaj rilatoj, kiel opiniis ok (8) organizoj. La ceteraj organizoj havis malsamajn opiniojn: 3 diris, ke ili havas fortajn kaj aktivajn rilatojn kun aliaj organizoj, 3 aliaj rilatas malforte kun aliaj organizoj, kaj aliaj 2 diris, ke ili havas sufiĉe fortajn rilatojn kun aliaj organizoj. Ceteraj 3 deklaris, ke ili tute ne rilatas kun aliaj organizoj




*Grafiko 10. Rempritasko de la nivelo de rilatoj kun aliaj junularaj organizoj*

La organizoj kunlaborantaj kun aliaj junularaj organizoj poste priskribis, kiajn tipojn de kunlaboroj ili realigis: plejmulto (12) priskribis, ke ili reciproke partoprenigas siajn


membrojn en la eventoj unu de la alia. Simile, 10 organizoj ankaŭ diris, ke ili kune organizas fizikajn kaj retajn eventojn. La ĉi-suba grafiko resumas iliajn respondojn:




*Grafiko 11. Manieroj kunlabori aŭ rilati kun aliaj junularaj esperantistaj organizoj*


### 2.2.3. Rilatoj kun eksteraj organizoj

El la respondintaj organizoj, neniu estis plena membro de naciaj junularaj konsilioj de siaj landoj. Plimulto (10) el la organizoj ne estas membroj aŭ ne havas rilatojn tiaj instancoj. Pliaj 2 konfirmis la neekziston de tia instanco, dum 4 ne scias, ĝi entute ekzistas aŭ ne. Entute, nur 2 organizoj membras en tia instanco sed kiel observantoj aŭ alispecaj membroj. La demando ne estis aplikebla al ELiSo.




*Grafiko 12. Membreco en nacia junulara konsilio de la landoj de organizoj*

Simile, granda plejmulto (16) el la organizoj deklaris, ke ili ne estas membroj aŭ sekcioj de aliaj eksteraj organizoj krom TEJO. Nur 3 konfirmis, ke ili estas membroj aŭ sekcioj.




*Grafiko 13. Membreco en aliaj tegmentaj organizoj krom TEJO*

## 2.3. Junularaj organizoj dum la Pandemio

### 2.3.1. Ĝenerala Funkciado

Kiel unue menciite en la sekcio 1.2 ("Aktuale: Raporto pri KODEJO 2020") de tiu ĉi raporto, al la demandaroj estis aldonitaj gravaj kaj ĝustatempaj demandoj kiuj celis enketi ĉe la organizoj pri la observitaj efikoj de la pandemio (KOVIM-19) sur iliajn funkciadon kaj evoluon. Ĉi tiu sekcio detaligos la rezultojn de tiu enketo.

La ĝenerala tendenco observita inter multaj junularaj organizoj, laŭ iliaj respondoj, estas negativa: plimulto (10) fariĝis malpli aktiva aŭ bone funkcianta rezulte de la pandemio. Aliflanke, 4 organizoj tamen observis pozitivan evoluon, dum 3 observis neniun rimarkindan ŝanĝon en sia agado. Al du organizoj, JEFO kaj ELiSo, ne eblis taksi la aktivecon de ilia organizo. La ĉi-suba tabelo grupigas organizojn tiurilate:

Tabelo 6. Mempritaskoj de la funkciado de organizoj dum la pandemio

| Ĝenerala Aktiveco kaj Funkciado | Organizoj |
|---|---|
| **Pozitiva (+)**<br>(pli aktive funckiis aŭ agadis dum la pandemio ol antaŭ ĝi) | FEJ, IEJ, MEJ, MJS |
| **Neŭtrala (0)**<br>(neniu rimarkinda ŝanĝo okazis) | BEJO, GEJ, HEJ |
| **Negativa (-)**<br>(malpli aktive funckiis aŭ agadis dum la pandemio ol antaŭ ĝi) | BEMI, ĈEJ, DEJO, IREJO, JEB, KEJ (Katalunio), KEJ (Sud-Koreio), KEJO, NEJ, SKEJ |
| **Ne aplikeblas/Ne scias** | JEFO, ELiSo |

Tiu tendenco kongruas kun la ideo, ke la severaj limigoj kaŭzitaj de la pandemio sur homajn moviĝon kaj kuniĝon efektive haltigis la normalan funkciadon de junularaj organizoj eĉ sur la loka nivelo.


Malgraŭ la observita malpliaktiviĝo de organizoj, plimulto (8) konstatis, ke iliaj rilatoj kun aliaj junularaj esperantistaj organizoj kreskis dum la pandemio, dum nur 4 konstatis la malon. Ĉirkaŭ triono (7) notis neniun rimarkindan ŝanĝon en siaj rilatoj kun aliaj organizoj.




*Grafiko 14. Ŝanĝoj en la rilatoj kun aliaj organizoj kaj ties rilato al la pandemio*

### 2.3.2. Retaj eventoj dum la Pandemio

Sekvas la temo pri retaj eventoj dum la pandemio. La Komisiono konstatis la fakton, ke ĉirkaŭ triono (7) de la respondintaj organizoj tute ne okazigis retajn eventojn en 2020. La ceteraj 12 ja okazigis retajn eventojn, sed en malsamaj oftecoj: 6 deklaris, ke ili neregule okazigis retajn eventojn, 4 okazigis ĉiumonate, dum 2 ĉiun duan monaton.




*Grafiko 15. Ofteco de la okazigo de retaj eventoj en 2020 (specife dumpandemie)*

La kutimaj tipoj de eventoj kiujn okazigis kelkaj organizoj estas: renkontiĝoj (7), lingvaj kursoj (5), prelegoj kaj simpozioj (4), kaj varbaj eventoj kaj kongresoj (po 1).




*Grafiko 16. Tipoj de retaj eventoj organizitaj dum la pandemio en 2020*

Por ebligi la okazigon de retaj eventoj, plipopulariĝis kelkaj retaj videokonferencaj programoj. Inter tiuj troviĝas Zoom, kiun ĉirkaŭ duono (9) trovis utila; sekvas Jitsi (4), Google Meet, BigBlueButton, Skype, kaj Discord (po 1). Aliaj respondoj konsistis el Instagram, Gather.town, Telegram, kaj Streamyard kaj YouTube. Almenaŭ 5 organizoj ne donis respondon.




*Grafiko 17. Tipoj de programoj uzitaj por okazigi retajn eventojn*

Sekve, la organizoj resumis la problemojn, kiuj malfaciligis aŭ malebligis la okazigon de retaj eventoj. Dum 2 organizoj ne havis tiajn problemojn, multaj aliaj tamen jes, interalie la mankon de intereso aŭ engaĝiĝemo de membroj kaj celgrupoj (13). Jen listo de la problemoj, kiujn ĝenerale trairis organizoj rilate retajn eventojn:

1. **Manko de intereso aŭ engaĝiĝemo de membroj kaj celgrupoj** (13)
2. **Malrapida aŭ nestabila interreta konekto** (7)
3. **Manko de spertaj organizantoj, gvidantoj, aŭ teknikistoj** (4)
4. **Manko de taŭgaj aparatoj: komputiloj, kameraoj, ktp.** (3)
5. **Manko de aliro al bazaj rimedoj: elektro, interreta konekto, ktp.** (2)

Krome, nur 2 organizoj asertis, ke ili regule okazigis retajn eventojn eĉ antaŭ la pandemio, dum 2 aliaj foje okazigis retajn eventojn en la sama periodo. Alfilanke, plejmulto (13) el la organizoj kutimis okazigi ne retajn eventojn, sed nur fizikajn. Al 3 organizoj ne estis aplikebla la demando, inkluzive de MJS kiu estis fondita nur dum la pandemio.




*Grafiko 18. Kutimoj de organizoj rilate la organizadon de retaj eventoj antaŭpandemie*


Sur la pozitiva flanko, plejmulto (13) el la organizoj konfirmis, ke kelkaj iliaj membroj sukcesis partopreni internaciajn retajn eventojn de TEJO kaj UEA, interalie la 76-an IJK kaj la Virtualan Kongreson. Aldone, 4 pliaj asertis, ke eĉ multaj iliaj membroj partoprenis la samon. Nur 1 organizo informis, ke neniu el ĝiaj membroj sukcesis partopreni.




*Grafiko 19. Partopreno de membroj de landaj kaj fakaj organizoj en internaciaj retaj aranĝoj*


### 2.3.3. Resume pri funkciado dum la pandemio

Resumante la amplekson de la efikoj de la pandemio en 2020, pli ol du-trionoj (14) el la organizoj opiniis la efikojn plejparte negativaj. Nur 3 trovis la efikojn pozitivaj, dum 1 cetera observis entute neniun rimarkindan efikon sur sin. Unu alia, IEJ, ne povis diri, ĉu la efikoj de la pandemio estis pozitivaj aŭ negativaj.




*Grafiko 20. La ĝeneralaj efikoj de la pandemio sur landajn kaj fakajn organizojn en 2020*


Malgraŭ la ĝenerale negativaj efikoj de la pandemio, pli ol triono (8) el la organizoj estis optimismaj pri la eventuala evoluo de iliaj organizoj en la venonta unujara periodo (2021-2022). Nur 3 estis anticipantaj ke iliaj organizoj estos samgrade aktivaj. Tamen, ankaŭ pli ol triono (8) ankoraŭ ne sciis aŭ ne povis diri pri ilia eventuala sorto. Almenaŭ neniu estis pesimisma pri la evoluo de sia organizo.




*Grafiko 21. Prognozoj de organizoj pri sia evoluo en la unujara periodo 2021-2022*

Fine, la organizoj resumis siajn planojn kaj preferojn pri okazigo de eventoj en la t.n. "post-pandemia epoko", kiam multaj limigoj al vojaĝado kaj kunvenado estos vaste

forigitaj. Iliaj opinioj estas dividitaj, kvankam preskaŭ triono (6) esprimis intereson daŭre okazigi retajn eventojn laŭeble egale ofte kiel fizikajn eventojn. Du organizoj preferas daŭre okazigi plejparte retajn eventojn, dum aliflanke, 4 esprimis preferon reveni al plejparta okazigo de fizikaj eventoj. Tri organizoj ankoraŭ ne sciis pri siaj preferoj, dum laŭ 4 organizoj, ĈEJ, DEJO, SKEJ, kaj ELiSO, la demando ne estis aplikebla al ili.




*Grafiko 22. Preferoj de organizoj rilate la organizadon de retaj eventoj en la "post-pandemia" epoko*

## 2.4. KODEJO 1: Konklude

La jaro 2020 estis tre grava turnpunkto por multaj junularaj organizoj ĝuste pro la pandemio de KOVIM-19. Ni finfine povas vidi el pli vasta perspektivo, kiuj estis ĝiaj efikoj sur ĉiujn flankojn de la ĝenerala funkciado de junularaj organizoj kaj kiel la organizoj baraktis kontraŭ tiaj efikoj. En kelkaj organizoj agado iĝis malforta, eĉ preskaŭ nula; en aliaj, male. Ja, neniu organizo estis preta por la pandemio, sed evidentiĝis, ke kelkaj pli bone adaptiĝis poste ol la aliaj.

Malgraŭ siaj negativaj efikoj, la pandemio tamen samtempe instigis, ke organizoj repensu pri siaj aliroj rilate la okazigon de siaj iniciatoj: ekzemple, pluraj, kiuj kutimis okazigi nur fizikajn eventojn antaŭ la pandemio, komencis organizi ankaŭ retajn eventojn dum ĝi. Krome, multaj organizoj sukcesis partoprenigi siajn membrojn dum internaciaj retaj aranĝoj en 2020 (IJK, VK, ktp.), kio estis aparte grava paŝo por plitutmondigi la movadon kaj malplivastigi la "breĉon" inter esperantistoj el ekonomie disvolviĝintaj kaj el disvolviĝantaj (aŭ la tiel nomataj "nepagipovaj") landoj. Tiuj ŝanĝoj faris ne nur Esperanton, sed ankaŭ ĝian movadon iom pli alirebla al junuloj tra la mondo en manieroj kiujn oni neniam antaŭe vidis.

Aliflanke, tiu "revolucio" pri interreta kunvenado devas ankaŭ pensigi organizojn pri fundamentaj strukturaj ŝanĝoj kiuj definitive ebligus aŭ faciligas ties okazigon: okazas, ke la statutoj de kelkaj organizoj daŭre limigas tion, kiom ofte ili rajtas kunvenigi siajn membrojn aŭ estrarojn kaj kiom longe anticipe oni faru alvokojn al decidaj kunsidoj (kune kun aliaj burokrataj kaj loĝistikaj baroj al kunvendado, tio povus esti bona klarigo al tio, kial multaj organizoj daŭre kunvenigas siajn membrojn kaj estrarojn neregule). Ekzemple, TEJO mem en la pasintaj 1-2 jaroj ekde la pandemio eksperimentadis kun la okazigo de retaj kunvenoj de sia Komitato, kiujn ĝi neniam antaŭe faris—kun sufiĉe granda sukceso malgraŭ kelkaj teknikaj kaj burokrataj neglataĵoj. Kun tio venis pluraj modifoj al la Reglamento de TEJO, kiuj ebligis retan kunsidadon kaj faris ĝin esenca parto de la decidofara procedo. La samon faru landaj kaj fakaj organizoj, se ili ankoraŭ ne estis farintaj tion por demokratiigi aliron al la ĉiutaga decidofarado interne.

La Komisiono ankaŭ notas, ke preskaŭ duono de la organizoj estis optimismaj (aŭ almenaŭ ne estis pesimismaj) pri la evoluo de sia agado en la periodo 2021-2022. Oni bezonos lanĉi KODEJO-n dum pluraj jaroj por pli amplekse kompreni, kiel iros la tendencoj kaj kiel organizoj "resaltos" de la kripligaj efikoj de la pandemio.

# 3. KODEJO 2: Demandaro pri Informado kaj Varbado

KODEJO 2 aŭ la Demandaro pri Informado kaj Varbado estas la dua el tri demandaroj kiuj konsistigas la Kompletan Demandaron por Esperantaj Junularaj Organizoj (KODEJO). Ĝi celis eltiri esencajn informojn pri la funkciado kaj evoluo de la organizoj aŭ movadoj rilate la kampojn de interna kaj alekstera komunikado, merkatiko, kaj varbado de membroj.

JEFO (Francio) kaj MEJ (Meksiko) ne plenigis tiun ĉi formularon.

## 3.1. Informado

La formularo malfermiĝis per demando, kiujn aktivaĵojn ĉiu organizo taksis grava por sia agado. Per skalo, ĉiu respondinto taksis la gravecon de ĉiu opcio ekde 0 (ne aplikeblas), 1 (tute ne gravas), 2 (apenaŭ gravas), 3 (sufiĉe gravas), ĝis 4 (multe gravas).

Laŭ la respondintoj, la kvin agadoj plej gravaj por ĉiu organizo (en ordo de graveco) en 2020 estis:

1. **Reta informado** (60 poentoj)
2. **Organizado de renkontiĝoj retaj/fizikaj** kaj **reta trovebleco de la organizo** (po 58 poentoj)
3. **Partopren(ig)o en internaciaj esperantistaj renkontiĝoj** (57 poentoj)
4. **Kunlaborado kun TEJO** (55 poentoj)


Aliflanke, la malplej gravaj tipoj de agado laŭ la organizoj estis kunlaborado kun la neesperantistaj kaj kun nejunularaj esperantistaj organizoj en siaj propraj landoj aŭ fakoj. Vidu la tabelon ĉi-sube por vidi, kiel organizoj taksis diversajn tipojn de agadoj:

Tabelo 7. Pritasko de organizoj pri la graveco de malsamaj tipoj de agado

| Tipo de Agado (Poentoj) | Taksoj |
|---|---|
| **Reta informado** (60) | Multe gravas (9), Sufiĉe gravas (8) |
| **Organizado de eventoj retaj/fizikaj** (58) | Multe gravas (10), Sufiĉe gravas (4), Apenaŭ gravas (3), Tute ne gravas (0) |
| **Reta trovebleco de via organizo** (58) | Multe gravas (9), Sufiĉe gravas (6), Apenaŭ gravas (2), Tute ne gravas (0) |
| **Partopren(ig)o en internaciaj esperantistaj renkontiĝoj** (57) | Multe gravas (8), Sufiĉe gravas (7), Apenaŭ gravas (2), Tute ne gravas (0) |
| **Kunlaborado kun TEJO** (55) | Multe gravas (7), Sufiĉe gravas (7), Apenaŭ gravas |

| | |
|---|---|
| | (3) |
| **Kunlaborado kun aliaj junularaj esperantistaj organizoj** (51) | Multe gravas (4), Sufiĉe gravas (10), Apenaŭ gravas (2), Tute ne gravas (1) |
| **Fizika/Surloka informado** (45) | Multe gravas (3), Sufiĉe gravas (8), Apenaŭ gravas (4), Tute ne gravas (1), Ne aplikeblas (1) |
| **Kunlaborado kun neesperantistaj organizoj** (41) | Multe gravas (0), Sufiĉe gravas (9), Apenaŭ gravas (7), Tute ne gravas (0), Ne aplikeblas (1) |
| **Kunlaborado kun la vialanda nejunulara esperantista organizo** (40) | Multe gravas (3), Sufiĉe gravas (7), Apenaŭ gravas (3), Tute ne gravas (1), Ne aplikeblas (3) |


Efektive plej gravis informado kaj videbleco de organizoj, kio taŭge kondukas al la sekva demando: Ĉu en organizoj efektive ekzistas aparta fako aŭ grupo kiu okupiĝas specife pri Informado aŭ Merkatiko? Plimulto (9) konfirmis la ekziston de tia grupo en siaj organizoj, dum en la aliaj 8 organizoj neniu tia grupo ekzistas.




*Grafiko 23. Ekzisto de fakgrupoj specifaj pri Informado ene de landaj kaj fakaj organizoj*

### 3.1.1. Interna Komunikado

Unue, rilate internan informadon, Telegram montriĝis la plej populara interna komunikilo uzata de organizoj (12); sekve, Facebook/Messenger (10) kaj retpoŝto, precipe retlistoj (8) estis simile vaste uzataj de pluraj organizoj. Kelkaj organizoj ankaŭ uzis Whatsapp kaj siajn proprajn organizajn retejojn (po 4), Discord (3), kaj Instagram (1). Aldone, iuj organizoj krome uzis ceterajn komunikilojn kiel Gather.town kaj YouTube, i.a. Unu organizo deklaris, ke ili tute ne uzas ian internan komunikilon. Notindas ankaŭ, ke neniu organizo deklaris la uzadon de iu ekstera reta forumo por tiu ĉi celo.




*Grafiko 24. Tipoj de retaj komunikiloj uzataj de organizoj por interna komunikado*

### 3.1.2. Alekstera Informado


Due, pri alekstera informado: la respondintoj montris similajn tendencojn rilate komunikilojn uzataj por informi la neesperantistan publikon. Facebook/Messenger estis uzata kiel alekstera komunikilo de preskaŭ ĉiuj organizoj (16), multaj el kiuj uzis ankaŭ retlistojn kaj siajn proprajn retejojn (po 13). Pluraj uzis ankaŭ Telegram (9), Instagram (7), Twitter (5), kaj Whatspp (4). Ceteraj komunikoj uzataj estis YouTube, Discord, Reddit, Vikimedio, kaj podkastoj. Neniu el la organizoj uzis aŭ Tiktok aŭ Wechat en sia alekstera informado.




*Grafiko 25. Tipoj de retaj komunikiloj uzataj de organizoj por alekstera (publika) informado*

Krom per retaj komunikiloj, organizoj ankaŭ informis per varoj kaj alispecaj reklamiloj, kiujn ili uzadis. Pli ol duono el la respondintoj uzis afiŝojn kaj rubandojn (10) kaj flugfoliojn (9), ambaŭ sentempe popularajn metodojn, en sia informa agado. Ĉirkaŭ triono (6) utiligis

artaĵojn, ekzemple filmojn, kantojn, ktp., dum 4 uzis varojn (T-ĉemizojn, pinglojn, tasojn). Malpli da organizoj (po 3) uzis broŝurojn, libretojn, kaj retajn memlernajn kursojn por informi pri Esperanto. Aliaj manieroj por reklami estis partopreno en foiroj kaj festivaloj kaj reklamado en eksteraj eventoj, interalie. Du organizoj, aliflanke, uzis nenian reklamilon.




*Grafiko 26. Neretaj, tradiciaj varoj kaj alispecaj materialoj uzataj por reklami Esperanton*

Plejmulto (14) de la organizoj ankaŭ kutimis informi kaj en Esperanto kaj en siaj naciaj lingvoj. Dume, 2 informis plurlingve (ankaŭ en aliaj lingvoj krom la nacia kaj la esperanta) kaj nur 1 informis nur unulingve (en sia nacia).




*Grafiko 27. Praktikoj rilate informadon en Esperanto aŭ/kaj en la nacia lingvo*

## 3.2. Ĝeneralaj kaj specifaj bezonoj pri Informado

La Komisiono ankaŭ profitis de la okazo por demandi la organizojn, en kiuj elementoj de reta informado ili bezonus plibonigon aŭ eventuale eĉ helpon de TEJO. Plimulto (po 9) respondis, ke ili plej multe interesiĝus pri aktiva kaj vasta diskonigado de informiloj kaj kreado de bonkvalitaj informiloj. Pluraj ankaŭ esprimis siajn bezonojn rilate la administradon de retejoj kaj sociaj kontoj (5), trovado de taŭgaj platformoj por diskonigi informojn (4), kaj monfontoj por produkti informilojn (3). Nur unu bezonis helpon pri tradukado de informiloj. Tri organizoj deklaris ke ili bezonis neniun plibonigon aŭ helpon.




*Grafiko 28. Tipoj de bezonoj de landaj kaj fakaj organizoj rilate Informadon*

## 3.3. Informado kaj Varbado dum la Pandemio

Unu el la specialaj kaj gravaj partoj de tiu ĉi formularo estis demandoj, kiuj celis prilumi specife kiel junularaj organizoj adaptiĝis al la nova situacio en 2020 kaj ŝanĝis sian strategion pri informado kaj varbado, se entute.

Pozitive rimarkinda estas, ke pli ol duono (9) de la respondintoj konstatis, ke iliaj organizoj pli aktive informis rete dum la pandemio ol antaŭ ĝi, dum 5 pliaj notis neniun rimarkindan ŝanĝon en ilia aktiveco pri reta informado. Estas 3 organizoj kiuj deklaris, ke ili malpli aktive informis rete dum la pandemio ol antaŭ ĝi.

Tabelo 8. Evoluo en aktiveco de reta informado antaŭ kaj post la pandemio

| Aktiveco de Reta Informado (antaŭ kaj dum la pandemio) | Organizoj |
|---|---|
| **Pozitiva (+)** (pli aktive informis rete dum la pandemio ol antaŭ ĝi) | BEJO, BEMI, FEJ, GEJ, IEJ, KEJ (Katalunio), KEJ (Sud-Koreio), MJS, NEJ |
| **Neŭtrala (0)** | ELiSo, HEJ, IREJO, JEB, KEJO |

| | |
|---|---|
| (neniu rimarkinda ŝanĝo okazis) | |
| **Negativa (-)**<br>(malpli aktive informis rete dum la pandemio ol antaŭ ĝi) | ĈEJ, DEJO, SKEJ |
| **Ne aplikeblas/Ne scias** | - |

La organizoj ankaŭ raportis pri la konkretaj rezultoj de ilia varba agado—ĉu ili, ekzemple, sukcesis venigi pli da membroj per siaj varbaj iniciatoj (plejparte retaj) lanĉitaj dum la pandemio ol antaŭ ĝi (de 2019 ĝis frue en 2020). Aperis tamen ne tre favoraj rezultoj, t.e. ke ĉirkaŭ triono (6) deklaris, ke ili varbis malpli da membroj (negative) dum la pandemio en 2020. Nur 3 organizoj sukcese varbis pli da membroj (pozitive) dum la pandemio, dum alia triono (6) ne vidis rimarkindan ŝanĝon (neŭtrale) en la rezultoj de siaj varbaj iniciatoj. Cetere, BEMI kaj ELiSo konstatis ke al ili ne ial aplikeblis la demando.

Tabelo 9. Rezultoj de Varbado (antaŭ kaj dum la pandemio)

| Rezultoj de Varbado dum la Pandemio (kompare kun la periodo tuj antaŭ la pandemio 2019-2020) | Organizoj |
|---|---|
| **Pozitiva (+)**<br>(sukcese varbis pli da membroj per iniciatoj dum la pandemio) | FEJ, KEJ (Katalunio), MJS |
| **Neŭtrala (0)**<br>(neniu rimarkinda ŝanĝo okazis) | ĈEJ, GEJ, HEJ, IREJO, IEJ, JEB |
| **Negativa (-)**<br>(varbis malpli da membroj per iniciatoj dum la pandemio) | BEJO, DEJO, KEJO, KEJ (Sud-Koreio), NEJ, SKEJ |
| **Ne aplikeblas/Ne scias** | BEMI, ELiSo |

Rilate la antaŭajn demandojn, la organizoj rakontis ankaŭ pri la informaj aŭ varbaj iniciatoj, kiujn ili realigis dum la pandemio en 2020, pluraj el kiuj ili kutime ne aŭ neniam realigis antaŭ la pandemio. Jen la respondoj de la respondintaj organizoj:


Tabelo 10. Specifaj varbaj iniciatoj lanĉitaj dum la pandemio en 2020

| Organizo | Informaj/varbaj iniciatoj dum la pandemio |
|---|---|
| **BEJO** | Okazigis retajn kongresojn; ofertis senpagan membrecon; aktive uzis sociajn retejojn |
| **BEMI** | Plurfoje okazigis retajn BEMI-tagojn |
| **ĈEJ** | Verkis artikolon pri esperatumado dum la pandemio; kontaktis novajn membrojn pri la ebleco partopreni en retaj E-renkontiĝoj |

| | |
|---|---|
| **ELiSo** | Starigis propran retejon kaj aliĝilon; kontaktis esperantistajn vikimedianojn pri eventuala aliĝo al la organizo |
| **FEJ** | Okazigis retan publikan enkondukan kurson; afiŝis reklamilojn sur proprajn sociajn kontojn |
| **GEJ** | Okazigis publikajn seminariojn pri aktiva partopreno en la organizo |
| **IEJ** | Pli ofte sciigis membrojn kaj aliajn interesitojn pri retaj aktivaĵoj |
| **NEJ** | Organizis la unuan retan Internacian Junularan Kongreson; organizis retajn renkontiĝojn por ludado inter nederlandaj kaj alilandaj junuloj |

Ĉiuj aliaj organizoj ne en la listo deklaris neniun agadon.

Fine, estis aldonita nova demando pri efektiva uzado de Eventa Servo, kiu populariĝis en 2020 por reklami retajn eventojn dum la pandemio. Rilate ĝin, 6 deklaris, ke ili regule uzis ĝin, 7 fojfoje uzis ĝin, dum 2 deklaris ke ili iam uzis ĝin (sed ne plu) kaj 2 aliaj tute ne uzis ĝin, ne kapablis uzi ĝin, aŭ ne sciis pri ĝi antaŭe.




*Grafiko 29. Uzado de Eventa Servo fare de landaj kaj fakaj organizoj*

## 3.4. KODEJO 2: Resume kaj Konklude

La daŭripovo de ĉiu organizo dependas de homoj, kiuj partoprenas aŭ subtenas ĝian agadon, kaj ĝuste pro tio, la Komisiono kredas, ke interna kaj alekstera informado, kun siaj varbaj valoroj, devas esti konstanta parto de organiza funkciado.

Kun la plimultiĝo de homoj, kiuj aktive uzas sociaj retejoj por siaj ĉiutagaj vivoj kaj la samtempa rapida plimoderniĝo de la funkcioj de tiaj retejoj en la pasintaj kelkaj jaroj, retaj agado kaj videbleco evidente iĝis egale gravaj kiel la tradiciaj, fizikaj manieroj. Por kelkaj organizoj kiuj havas malpli organizitajn homfortojn, estas en malpli oportunaj ekonomiaj aŭ geografiaj cirkonstancoj, aŭ troviĝas en lokoj, kie daŭre restas granda sanriskoj, reta agado estas ofte eĉ pli grava ol surloka informado. Kvankam tiu fakto estis malpli evidenta antaŭ kelkaj jaroj, la pandemio tamen reliefigis ĝin kaj ankaŭ akcelis la procezon, en kiu organizoj konatiĝis kun tiu relative nova tereno kaj elpensis taŭgajn strategiojn.

Resume, jen la gravaj faktoj kaj tendencoj pri informa agado laŭ KODEJO 2:

- Duono de organizoj havas iajn laborgrupojn pri Informado, dum la alia duono ne;
- Reta informado kaj reta trovebleco estas du el la aktivaĵoj plej gravaj al organizoj;
- Ĉiuj organizoj uzas sociajn retejojn ĉu por interna komunikado, ĉu por alekstera informado;
- Daŭre restas popularaj la tradiciaj, paperaj manieroj por informi, kvankam ilia efektiva uzado malplioftiĝis dum la pandemio;
- Plimulto el la organizoj komencis pli aktive kaj diversmaniere informi pri sia agado rete dum la pandemio ol antaŭ ĝi;
- Multaj organizoj spertis malfacilaĵojn varbi novajn membrojn; kaj
- Multaj organizoj informis unu la aliajn pri sia agado pere de servoj kiel Eventa Servo.

Per pli aktiva reta informado do, kiun la pandemio postulis al ili, landaj kaj fakaj junularaj organizoj faris sian agadon pli travidebla ne nur al siaj membroj, sed ankaŭ al la tutmonda junulara reto. Nuntempe, malfermante la paĝojn de aliaj organizoj en Facebook aŭ Twitter, oni nun pli ofte vidas enhavon pri pasintaj kaj venontaj agadoj, kaj tiel lerni el bonaj praktikoj realigitaj kaj partopreni en la realigotaj. La movado nun havas pli enhavoriĉan "arkivon" de sia agado pere de fotoj, filmetoj, kaj raportoj afiŝitaj rete.

# 4. KODEJO 3. Demandaro pri Financoj


KODEJO 3 aŭ la Demandaro pri Financoj estas la lasta el tri demandaroj de KODEJO. Ĝi celis havigi esencajn informojn pri la financaj stato kaj evoluo de la organizo aŭ movado en 2020 kaj pri iliaj praktikoj koncerne enspezadon, subvencipetadon, kontadon, ktp.

JEFO (Francio) kaj MEJ (Meksiko) ne plenigis tiun ĉi formularon.

## 4.1. Bazaj Informoj

### 4.1.1. Membrokotizoj

Unue venis demando pri membrokotizoj. En klara plejmulto de la organizoj (13), membroj ĝenerale pagas kotizojn. En kelkaj organizoj tamen ne (4).





*Grafiko 30. Efektiva praktiko de organizoj rilate pagigon de membrokotizoj*

Demandite pri la kialoj de nepostulo de kotizoj, unu organizo diris, ke la loka kortumo ankoraŭ ne permesis al ili statutŝanĝon kiu permesus al ili pagigon de membrokotizoj. Alia organizo diris, ke la kotizoj fortimigus homojn, kaj ke ilia nejunulara organizo ĉiukaze pretus subteni ilin finance se ili bezonus monon. Kaj alia diris, ke ili ankoraŭ estis tre nova organizo kun neniu regularo, kiu formaligus membrokotizadon.

Inter tiuj, kiuj deklaris ke iliaj membroj pagas kotizojn, plejmulto (9) diris, ke ekzistas malsamaj kategorioj de membreco, kiuj postulus, ke kotizoj ne estu egalaj. En la aliaj 4, ĉiuj membroj pagas la saman kotizon. Pluraj organizoj difinas membrokategoriojn laŭ aĝogrupoj (t.e., ke malpli junaj homoj pagas pli) kaj dividas aĝogrupojn aŭ laŭ la difinoj de TEJO aŭ de siaj propraj landaj leĝoj. En aliaj kazoj, kategorioj ankaŭ ekzistas surbaze de la ekonomia stato de la koncerna membro, ke kotizoj estas dividitaj ekzemple inter tiuj de laborantoj, de senlaboruloj, kaj eĉ de studentoj. Aliaj kategorioj, kiuj aperas, estas tiuj por


subtenantoj aŭ patronoj kaj eĉ por handikapuloj kaj iliaj kunuloj. En pli viglaj kaj stabilaj organizoj, ekzemple BEJO, eĉ troviĝas aparta kategorio por dumvivaj membroj.




*Grafiko 31. Egaleco inter membrokotizoj en landaj kaj fakaj organizoj*

#### 4.1.2. Monfontoj

Gravas ankaŭ scii, kiel organizoj financis sian agadon en 2020 ĝenerale, ĉu antaŭ, ĉu dum la pandemio. Organizoj deklaris diversajn monfontojn, sed membrokotizoj daŭre restas kiel la plej kutima monfonto inter junularaj organizoj kun preskaŭ du-trionoj (12) deklarintaj ĝin. Proksime sekvas donacoj (11) kaj eventaj aliĝkotizoj (8). Aliflanke, 2 organizoj deklaris, ke ili ne havis monfontojn en 2020.




*Grafiko 32. Tipoj de monfontoj disponitaj de organizoj en 2020*


Organizoj ankaŭ elektis el diversaj tipoj de monfontoj unu, kiu estis al ili la plej grava (t.e., tiu, kiu alportas al ili la plej grandan porcion da enspezoj). La organizoj tamen havis diversajn opiniojn kaj elstaris neniu el la opcioj.

La jenaj estas la kvin monfontoj kiujn pluraj organizoj taksis la plej gravaj:

1. **Eventaj aliĝkotizoj** (4)
2. **Membrokotizoj** (3)
3. **Eksteraj subvencioj, postsubvenciaj profitoj,** kaj **buĝetoj de nejunularaj esperantistaj organizoj** (po 2)

### 4.1.3. Subvencipetado

Subvencioj estas ĝenerale akceptataj kiel esencaj monfontoj por la agado de junularaj organizoj. Tamen, tre malmultaj organizoj iam ajn ricevis subvenciojn kaj des pli malmulte (3) estis aktive ricevantaj subvenciojn je la tempo de respondado al tiu ĉi demandaro. Aliaj 3 iam ricevis subvenciojn en la pasintaj tri jaroj kaj 1 estis meze de subvencipeta procezo. Aliflanke, pli ol duono (9) de la organizoj deklaris, ke ili neniam ricevis subvenciojn. Al unu cetera organizo, KEJ (Sud-Koreio), la demando ne estis aplikebla.





*Grafiko 33. Praktikoj rilate subvencipetadon ekster la Esperanta movado*

Kelkaj el la menciitaj subvencio-donantoj estas: UEA (kaj ties fondusoj kaj kontinentaj komisionoj), TEJO (precipe pere de la Fonduso Trampolino), Erasmus+, Fondaĵo Vikimedio, kaj kelkaj ŝtataj instancoj en Slovakio kaj Germanio.


### 4.1.4. Administrado de Financoj

Ĉirkaŭ duono el la organizoj (8) deklaris, ke ili havis pretajn financajn raportojn en 2020, dum 7 pliaj deklaris mankon de tia raporto. Du organizoj, KEJ (Katalunio) kaj MJS diris, ke ne estis aplikebla al ili la demando. Ne estis tuj konataj la kialoj de la manko de financaj raportoj, sed povus esti kialoj la manko de homfortoj, de elspezoj pro la pandemio, ktp.





*Grafiko 34. Efektiva havebleco de financaj raportoj de organizoj fine de 2020*

Rilate bilancojn: estis bona novaĵo, ke plejmulto el la organizoj havis pozitivan (pli ol 0 EUR) bonhavon en 2020. El tiuj organizoj, 8 havis inter 0 kaj 1000 EUR da bonhavo, dum 6 pliaj havis eĉ pli ol 1000 EUR. Aliflanke, tamen, estis kelkaj organizoj kun negativa bonhavo (malpli ol 0 EUR), 2 el kiuj havis inter 0 kaj -1000 EUR kaj unu plia eĉ malpli ol -1000 EUR.





*Grafiko 35. Pritakso de la efektiva bilanco aŭ bonhavo de organizoj fine de 2020*

Pli ol duono (9) el ĉiuj organizoj, tamen, ne havis proprajn organizajn bankokontojn por sekurigi sian monon. Nur 7 havis proprajn kontojn kaj 1 plia estis meze de procezo akiri konton. Notu ke tiu ĉi kunteksto, "propra organiza bankokonto" signifas, ke la bankokonto tenas la nomon de la organizo, ne de iu ajn individua persono.




*Grafiko 36. Utiligado de bankokontoj fare de landaj kaj fakaj organizoj*

Simile, preskaŭ ĉiuj el la organizoj aŭ ne aktive uzas sian konton en Universala Esperanto-Asocio aŭ UEA (8), ne havas konton (4), aŭ ne scias, ĉu ili entute havas konton (4). Nur unu el 17 organizoj estis aktive uzanta sian konton. (Klarigo: Landaj kaj fakaj sekcioj rajtas starigi konton en UEA per skriba peto al ĝia Ĝenerala Direktoro. Individuaj membroj de UEA, organizoj, kaj fondusoj povus starigi konton en UEA por ĝiri monon al aliaj individuoj kaj organizojn, disponi pagatajn servojn de UEA aŭ de aliaj organizoj, donaci kaj ricevi donacojn, inter multaj aliaj celoj.)




*Grafiko 37. Utiligado de UEA-kontoj fare de landaj kaj fakaj organizoj*

## 4.2. Ĝeneralaj kaj specifaj bezonoj pri Financoj

Ĉu organizoj bezonus unu aŭ plurajn tipojn de subteno de TEJO rilate sian financan staton? Ĉirkaŭ duono (9) el la respondintaj organizoj deklaris, ke ili bezonus neniun helpon de TEJO. Aliflanke, el tiuj, kiuj deklaris eventualan bezonon, plej multaj (7) diris, ke ili bezonus konsilojn aŭ teknikan subtenon de TEJO pri subvencipetado al eksteraj organizoj, dum 5 esprimis, ke ili ŝatus ricevi ian trejnadon pri administrado de financoj. Krome, 4 pliaj ankaŭ esprimis intereson profiti el iu malgranda subvencio de TEJO, interalie Fonduso Trampolino, kaj 1 alia petis disvastigon de informoj pri siaj eventualaj projektoj.





*Grafiko. 38. Tipoj de bezonoj de organizoj rilate siajn financojn kaj ties administradon*

## 4.3. Financoj dum la Pandemio


Por analizi la evoluon de la financoj de junularaj organizoj de la pandemio, oni demandis ilin, ĉu ili sukcesis realigi ian enspezigan projekton aŭ ricevi subvenciojn dum la pandemiaj monatoj de 2020. Tre malmultaj (3), tamen, konfirmis ke ili aŭ organizis enspezigajn projektojn aŭ ricevis subvenciojn en tiu periodo. Ĉiuj ceteraj, krom MJS kiu estis nova organizo en 2020, neis.

Tiuj tri organizoj ankaŭ detaligis la financajn aktivaĵojn, kiujn ili realigis en 2020. Ili okazigis kampanjojn por varbi membrojn por enspezi per membrokotizoj, petis subvenciojn de landaj kaj internaciaj instancoj, ricevis donacojn el impostoj, interalie. Multaj organizoj emfazis, ke kvankam ili realigis neniun iniciaton por enspezi monon, ili samtempe nek elspezis multe da mono ĉar iliaj agadoj estis limigitaj de la pandemio.




*Grafiko 39. Praktika evoluo (per enspezo aŭ subvencio) de financoj ĝis la fino de 2020*

Fine, organizoj priskribis la rilaton inter la pandemio kaj siaj financoj, kaj kia estis precize la efikoj de la pandemio sur sian financan staton fine de 2020. Malgraŭ la drastaj limigoj al la movado kaŭzitaj de la pandemio, ne ŝanĝiĝis rimarkinde la financoj de multaj organizoj, laŭ pli ol duono (9) de la organizoj enketitaj. Tiun mankon de ŝanĝo oni povus ekspliki per la fakto, ke ĝenerale mankis kaj enspezoj kaj elspezoj samtempe. Pliaj 7 diris, ke la pandemio kaŭzis negativan influon sur iliajn financojn (t.e., ke nete ili malgajnis monon) en la sama periodo. Al unu cetera organizo, MJS, estis nova organizo en 2020 kaj al ili ne aplikeblis la demando. En neniu organizo estis observita ia neta pozitiva kresko en financoj en 2020.




*Grafiko 40. Rilatoj inter la pandemio kaj la evoluo de financoj de landaj kaj fakaj organizoj en 2020*

## 4.4. KODEJO 3: Konkludoj

Almenaŭ el praktika vidpunkto oni povas vidi monon metafore kiel oleon, kiu estas bezonata por funkciigi motoron. Kvankam aktivuloj de junularaj organizoj plej ofte laboras volontule (kaj tiel ne akiras monon), pluraj agadoj ja ne estas senkostaj.

La Komisiono konkludas, ke la ĝenerala stato de financoj kaj ties administrado fare de landaj kaj fakaj junularaj organizoj ne estas tre kontentiga, ke ili bezonas pli da organiziĝo kaj spertiĝo rilate siajn financojn, kaj por plenumi tiun celon, la eventualan aktivan subtenon de TEJO—malgraŭ tio, ke pli ol duono opiniis, ke ili bezonus neniun helpon de TEJO. Multo estas plibonigenda rilate administradon de financoj kaj trovadon de financigaj ebloj (monfontoj) ene de organizoj, kaj la jenaj faktoj subtenas tiun aserton:

- Pli ol duono (9) organizoj neniam ricevis subvenciojn;
- Almenaŭ 7 organizoj ne verkis aŭ publikigis financan raporton por 2020;
- Pli ol duono (9) organizoj ne havis bankokonton;
- Nur unu organizo aktive uzis sian UEA-konton, kaj tiuj, kiuj ne havis konton aŭ ne sciis, ĉu ili havis konton aŭ ne, konsistigas preskaŭ duonon (8) de la organizoj.

Estas multaj kialoj kiuj klarigus tiujn mankojn: ĉu la manko de spertaj homfortoj, ĉu la manko de oportunoj, ĉu lokaj leĝoj ktp., kvankam tiu ĉi esploro ne donis al la respondintoj la oportunon por detale klarigi tion. Ĉiukaze, ja sufiĉe da organizoj opiniis, ke ili bezonus teknikan subtenon aŭ trejnadon pri administrado de financoj fare de TEJO (eĉ pli ol rektan financan subtenon). Oni povas imagi, ke kompili buĝeton aŭ financan raporton, organizi pagmanierojn, kaj peti subvenciojn estas malfacilaj taskoj kiuj postulas fakan konon, sed ilin ja eblas lerni sen nepre esti kontisto aŭ komercisto.

La pandemio ankaŭ ne helpis tiurilate, ĉar multaj organizoj vidis negativan evoluon rilate siajn financojn (aŭ almenaŭ neniun evoluon). Tamen, intertempe pro la malpliiĝantaj efikoj de la pandemio sur landajn ekonomiojn kaj moviĝeblon, kelkaj instancoj denove malfermas eblojn al junularaj organizoj pri la okazigo de eventoj. La Komisiono esperas, ke en la venontaj jaroj, organizoj denove vidos pozitivan kreskon en siaj financoj.

# 5. Rekomendoj

## 5.1. Ĝeneralaj Rekomendoj pri Funkciado

Rekte vidinte la profundajn efikojn de la pandemio sur la funkciadon de junularaj organizoj kaj ankaŭ la centran dumpandemian rolon de reta agado, la Komisiono firme rekonas la daŭripovon kaj la relativan inkluzivemon de reta agado. Ĝi instigas do TEJO-n ĝenerale kiel tegmentan organizon, ke ĝi daŭre kunlaboru kun landaj kaj fakaj organizoj kaj instigu ilin al pli aktiva, seninterrompa organizado de retaj eventoj en la venontaj jaroj por teni sian tutmondan aktivulan reton interkonektita kaj aktive kunlaboranta kaj ankaŭ demokratiigi aliron al kernaj organizaj servoj kaj decidoj. Samtempe, tamen, por atingi tiun celon TEJO samtempe devas daŭre provizi junularajn organizojn per ĉiaj subtenoj teknikaj. Ĉiuj komisionoj de TEJO estas same kuraĝigataj, ke ili adoptu iniciatojn, kiuj estas retaj kaj taŭgaj al partopreno de aktivuloj de diversaj kontinentoj.

## 5.2. Ĝeneralaj Rekomendoj pri Informado kaj Varbado

La Komisiono rekomendas al landaj kaj fakaj organizoj, ke ili daŭre aktive informu pri sia agado kaj varbi novajn membrojn pere de retaj kanaloj, kaj se cirkonstancoj jam ebligas tion, denove per fizikaj, surlokaj ebloj. Kvankam en pluraj landoj la intenseco de la pandemio komencis malfortiĝi kaj tiel oni ekrajtis denove okazigi surlokan agadon, organizoj tamen strebu al ekvilibro inter fizikaj kaj virtualaj agadterenoj—kun emfazo sur pluan tenadon de reta agado—kaj tiel maksimume atingi la junularon. Subtene al tiu celo, TEJO, per ĝiaj homfortoj (interalie, ĝia oficisto pri merkatiko), estas preta por disponigi helpon al landaj kaj fakaj movadoj, i.a. per kreado de taŭgaj grafikaĵoj, publikigo de afiŝoj kaj anoncoj en siaj sociaj retejoj, aŭ alispeca teknika subteno.

## 5.3. Ĝeneralaj Rekomendoj pri Financoj

La Komisiono rekomendas al la koncernaj organoj kaj ofichavantoj ene de TEJO, interalie al la Kasisto, la dungitaj subvencipetistoj, aŭ aliaj respondeculoj pri projektoj kaj subvencioj, ke ili kunlaboru rekte aŭ nerekte kun landaj kaj fakaj organizoj ne nur por pli klare prilumi la situacion, sed ankaŭ por proponi konkretajn solvojn kiuj enkondukas organizojn en daŭripovan financan kreskon. Kasistoj, reviziantoj, kaj respondeculoj pri projektoj kaj financoj de landaj kaj fakaj junularaj organizoj povus interŝanĝi spertojn kaj bonajn praktikojn rilate financojn, kaj ĝuste oportunojn por tio devas ebligi TEJO kiel la tegmenta "alianco." Ekzistas taŭgaj helpiloj pri subvencipetado (kiel en la Aktivula Akademio), kaj surbaze de tiuj materialoj, la spertuloj en la TEJO-teamo pripensu okazigi kapabligon kune kun koncernaj respondeculoj de landaj kaj fakaj organizoj.